



*cista florado*

# esperanto

## Provence

**kvaronjara gazeto de la Provenca Esperanto-Federacio n° 104 - printempo 2016**

### **federacia retejo**

[www.esperanto-provence.org](http://www.esperanto-provence.org)

### **nia federacio sur Facebook**

[www.facebook.com/  
esperantoprovence](http://www.facebook.com/esperantoprovence)

### **prezidanto**

Pierre Oliva  
2772 Montée du Vieux Camp  
83330 Le Castellet  
06 76 55 57 23  
[nlpolecamp@gmail.com](mailto:nlpolecamp@gmail.com)

### **baza kotizo por aliĝo**

**(kun la gazeto) : 6€**

ĉeko al :

"Espéranto-Provence"  
pere de via loka asocio  
aŭ sendota al la

### **kasisto**

Nicole Lafitte  
2772 Montée du Vieux Camp  
83330 Le Castellet  
[nlpolecamp@gmail.com](mailto:nlpolecamp@gmail.com)

### **sekretario**

### **redaktoro kaj enpaĝiganto**

Pascal Vilain  
61 Montée du Castelar  
83460 Taradeau  
06 42 19 68 51  
[p.vilain83@orange.fr](mailto:p.vilain83@orange.fr)

**limdato por sendo de  
publikotaĵoj por la venonta n°  
30-a de Junio 2016**

bonvolu sendi al la supra retadreso  
antaŭdankojn pro viaj kontribuajoj

### **Vorto de la Prezidanto**

Alvenis la suno, floroj, varmeto. Estas ja printempo, t.e. fortoj por ĉiuj. Kompreneble, ni ege bezonas ilin, ĉar por ni, Provencanoj, la nuna ĉefa zorgo estas la preparado de la Nacia Kongreso de *Espéranto-France* en Marsejlo.

Feliĉe, *Espéranto-Provence* kapablas solvi ĉiujn problemojn danke al labor-ema kaj metoda skipo. Tian efikecon ni ŝuldas al *Thierry Spanjaard*, nia LKK-prezidanta moŝto, sperta pri organizado kaj kono de la kongresurbo. Kaj vi, karaj gefederacianoj, ne forgesu nian membrokunvenon, kiu okazos en la lasta tago de la kongreso, la 8-an de Majo, en la marsejla kongresejo «*Canopée*». Al vi ĉiuj, bonajn printempon... kaj laboron !

*Pierre Oliva*

### **Federacia evento !**



Sendube, vi jam ricevis aliĝilon por la Kongreso de *Espéranto-France*, kiu okazos en nia regiono dum la «ĉielira» semajnfino, kaj plej verŝajne vi jam aliĝis. Dulingva retejo donas al vi ĉiujn informojn pri tiu grava evento :

### **Bonvenon al la Eŭromediterranea kongreso de Esperanto !**

Ĝia temo estas : "Marsejlo Pordo de Eŭromediterraneo".  
<http://kongreso2016.esperanto-france.org/?lang=eo>

### **Bienvenue sur le site du Congrès euroméditerranéen d'espéranto !**

4 jours de congrès pour allier pratique de l'espéranto  
et découverte de la culture locale.

Un programme riche et varié pour s'adapter à tous les goûts !  
<http://kongreso2016.esperanto-france.org/?lang=fr>

## Federacia agado

**Nia federacia membro-kunveno okazos kadre de la Nacia Kongreso de Esperanto-France. kiam ? > de la 10-a ĝis la 12-a, dimanĉon la 8-an de Majo. kie ? > Canopé - 31 boulevard d'Athènes 13001 Marseille**

La moralan, agadan kaj finanĉan raportojn por la jaro 2015 vi jam povis legi en la januara numero (n° 103) de via gazeto. La kunvoko, tagordo kaj voĉdona rajtigilo estas aldonitaj al ĉi tiu printempa numero.

## El la regionaj asocioj

### ★ 04 - EKEM - Esperanta Kulturo en Manosque

Laŭ peto de la Hiroŝima Esperanto-Centro okaze de la Internacia Virina Tago, EKEM sendis la jenan tekston por ekspozicio de tutmonda mesaĝaro :

"La Esperanta grupo de Manosque partoprenas kiel kutime en la Internacia Virina Tago de Hiroŝima 2016.

Ni devas kunlabori por la malapero de la multnombro de la mortiloj en la mondo. *Martin Luther King* diris : « Ni devas lerni kunvivi kiel gefratoj, aliel ni pereos kune kiel stultuloj. » Ni serĉu la pacan vojon."

### ★ 13 - Centre Culturel Esperanto-Marseille



*feliĉaj laboremuloj*

Jam de monatoj, kelkaj personoj aktive laboras por prepari sukcesan kongreson de Esperanto-France. Pluraj el ili, sed ne ĉiuj, estas membroj de la marsejla klubo.

### ★ 83 - Esperanto-Klubo Fréjus - Saint-Raphaël

La 7-an de Februaro, samtage kiel la reĝkuka festo, okazis la ĝenerala membro-kunveno de la klubo.



La ĉefa kaj plej grava klubevento estas la organizado de la Mediteranea Esperanto-Semajno, ĉiam sukcesa. En la sekva paĝo, vi povos legi kompletan raporton verkitan de partopreninto : *Liba Gabalda*. Alia raporto de *Daniel Moirand*, kun fotoj de *André Grossmann*, estas aldonita sur aparta folio. (*el La Informilo n° 173*)

Jen la LKK-anoj :

- prezidanto : *Thierry Spanjaard*
- kasisto : *Pierre Oliva*
- sekretario : *Renée Triolle*
- eksteraj rilatoj : *Rosy Inaudi*
- kultura programo : *Flavie Wakako Audibert*
- responsulo pri akceptado : *Michel Cerisay*
- logistiko : *Marc Gallardo*
- gazetaraj rilatoj : *Didier Loison*
- informado : *Bruno Flochon*

...kaj multaj aliaj bonvolemluloj kiuj bone preparas tiun eventon. Dankon al ili !



Var-Matin, 8-an de Marto

## 10-a Mediteranea Esperanto-Semajno en *Les Issambres* 5-12/3/2016

*Liba Gabalda*

Ĝi okazis en la sud-franca feriejo «*Vacanciel*». En bela hotelo «*Val d'Esquières*», ĉirkaŭ cent personoj el dek landoj venis ĝui agrablan etoson ĉe la marbordo de la Mediteraneo. La eventon ĉeestis ankaŭ du-jaraĝa aminda knabineto *Marietta*.

La ĉeforganizantinoj *Christine Graissaguel* kaj *Monique Prezioso* (helpata de siaj familianoj kaj de aliaj esperantistoj), pretigis por ni allogan programon ĉe la Lazura Marbordo en *Les Issambres*. Dum la interkona vespero ni konatiĝis kun la instruantoj de la diversnivelaj Esperanto-kursoj.

Ĉiumatene, la tago komenciĝis per tri Esperanto-kursoj, dum tri horoj. La posttagmeza instruado, antaŭ la vespermanĝo, daŭris unu horon. La komencantojn instruis *Jindřiška Drahotová* el Ĉeĥio, kiun asistis por spertiĝi en la instruado ŝia samlandanino *Jaroslava Malá*. Pli spertajn esperantistojn sprite gvidis kaj multe paroligis *Gražina Opulskiene* el Litovio. Por la bonaj parolantoj, *Miguel Gutiérrez Adúriz*, el Hispanio, prezentis mikronovelojn, montris kiel publikigi filmojn en la reto kaj ankaŭ kantigis ilin. Ĉiuj partoprenantoj de la kursoj certe plibonigis sian lingvo-nivelon dum tiu unusemajna studado.

Dum la matena paŭzo la partoprenantoj teumis aŭ kafumis kaj interbabilis. Je ilia dispono estis ampleksa libroservo prizorgita de gesinjoroj *Schneider* kaj *Claudie Demongeot*. Pluraj ĉeestantoj aĉetis Eo-librojn kaj aliajn esperantaĵojn. Intereson vekis ankaŭ miaj fotoalbumoj kun raportoj pri diversaj Esperanto-aranĝoj.

Post la bongusta tagmanĝo, bela vetero favoris promenadojn en la ĉirkaŭaĵo kaj ekskursojn al pli foraj lokoj. Vespere okazis diversaj prelegoj kaj bildprezentoj.

Dimanĉon, kelkaj el ni vizitis la urbon *Fréjus* dum aliaj ĝuis ĉokoladan feston en la apuda urbeto *Roquebrune-sur-Argens*. Tie ni admiris grandegan ĉokoladtabulon. Ĝi pezis 220 kg, estis du metrojn longa kaj 10 centimetrojn dika. Poste oni dispecigis ĝin kaj disdonis al la vizitantoj. Vespere ni spektis teatraĵon «*La Viro-Semo*», kiu estis prezentita ankaŭ dum la UK en Lillo.

Mardon okazis ekskurso al fuorto *Brégançon*. Sur la insuleto, impona roko kaj sur ĝi majesta fuorto fariĝis ŝtata rezidejo de la francaj prezidentoj. La nuntempa prezidento *François Hollande* decidis malfermi ĝin al la publiko en la jaro 2012. Eblas viziti ĝin de Majo ĝis Septembro.

Multaj interesiĝas pri tiu fama loko kaj ĉiujare ĝi estas amase vizitata.

En la hotelo, ni tre bonguste kaj abunde manĝis. Dum libera tempo iuj kartludis, aliaj lernis danci, legis aŭ komputilis. Eblis ankaŭ partopreni en distraj aktivaĵoj kaj aliaj proponoj de la hotelo mem. Kelkaj el ni profitis tion. Ni povis partopreni en diversaj vortludoj, dancado, manlaboroj, enigmoj, gestuno (planita signolingvo), skrablo, karaokeo-kantado ktp.

Kelkfoje dum la semajno, en la hotelo instaliĝis vendistoj, kiuj proponis al la gastoj varojn por aĉetado. Inter ili troviĝis diversaj memoraĵoj, parfumoj, artikloj el lavado, sapoj, mantukoj, juveloj, mansakoj, koltukoj, varia sortimento da infuzaĵoj, teoj, mieloj kaj marmeladoj ktp.

Pri nia evento, aperis en la loka ĵurnalo «*Var-Matin*» favora artikolo kun komuna foto de la partoprenantoj. La titolo estas: «*Communication sans frontières aux Issambres*» (Komunikado sen baroj en *Les Issambres*).

Merkredon, ni trarigardis la arkeologian muzeon en la urbo *St-Raphaël* kaj en la kultura centro estis instalita bildekspozicio, kies temo estis kvadratoj. Tie ni povis admiri ankaŭ fotojn de *Pascal Vilain*. Li loĝas en tiu regiono kaj parolis al ni pri sia fotadhobio.

De *Gražina Opulskiene* ni eksciis pri la rilato de nia Majstro *Zamenhof* kun Litovio. Pri neceso de Esperanto en Eŭropo kaj pri la projekto TUJ parolis *Thierry Saladin*. De *Guy Perrin* ni akiris informojn pri la unua irana kongreso en Teherano, kiun li partoprenis. Li ankaŭ montris bildojn kaj per ili ni ekkonis la ĉefurbon kaj spektis aliajn belaĵojn de la lando. Same interesa estis bildprezentado pri Ĉilio, kiun prezentis *Jean-François Cousineau*. Aldonajn bildojn pri la Pasko-insulo komentis *Christine Graissaguel*. Dum la lasta adiaŭa vespero, la organizantoj pretigis tombolon, en kiu ĉiu gajnis ion. Sur scenejo, la partoprenantoj distris nin per kantoj, skeĉoj kaj aliaj amuzaj eroj. Ĉe la fino estis pridonacitaj la kursgvidantoj kaj la organizantoj. Al ĉiuj plaĉis akordiona muziko, kaj gaja dancado daŭris ĝis la noktomezo.

La aranĝo estis sukcesa, bela vetero kontribuis al la bona humoro de la partoprenantoj kaj ĉiuj bonfartis. Ni ĝuis agrablan semajnon en gaja etoso kaj promesis reveni venontjare al la sama alloga loko ĉe la Marbordo Lazura. Koran dankon al la organizantoj pro ilia strebo kaj bona laboro.

## Arta ekspozicio

Samsemajne kun MES okazis en la Kultura Centro de *Saint-Raphaël* elmontrado de artaĵoj pri la temo "kvadrato - unuforma ekspozicio", en kiu partoprenis, per naŭ el siaj fotografaĵoj, *Pascal Vilain*, membro de la loka Esperanto-klubo.

Post vizito al la arkeologia muzeo de la urbo, granda MES-grupo venis viziti la ekspozicion kaj babili kun la fotisto.



## Sekve de MES : spektindaĵoj

Ĉu unuafoje okaze de la Mediteranea Esperanto-Semajno ? Surloke estis registritaj filmetoj. Kelkaj bone reliefigas la laboron kaj entuziasmon de staĝintoj, dum aliaj pli bone konigas al ni jen kursgvidintinojn jen partoprenintojn.

**La filmetoj estas videblaj en la famkonata video-spektejo YouTube. Jen priaj resumetoj kaj ligoj :**

*Daniel Moirand* parolas pri sia esperanta traduko de "La mil kaj unu noktoj".

<https://youtu.be/12uCyX9GtE0>

*André Grossmann* parolas pri la "Esperanta alfabeto", laŭ verko de *Raymond Schwartz*.

[https://youtu.be/3jcY0cT\\_keU](https://youtu.be/3jcY0cT_keU)

Esperanta infana kanto kun teksto de *Valerij Vorobjov* kaj melodio de *Liven Dek*, kantita de *Lydia Buyst*, *Josiane Moirand*, *Sol Roca* kaj *Martine Demouy*.

<https://youtu.be/x6zhNyo2l8k>

Provludo de "Sidis la sinjoro Kato" : infana kanto, tradukita de *Liven Dek*, el la hispana, kaj prezentita de partoprenantoj de la 3a-grada kurso.

[https://youtu.be/U\\_1dMYm317g](https://youtu.be/U_1dMYm317g)

*Anne-Marie Leprevost* kaj *Jeanne Draime* kantas la konatan kanton de *Georges Brassens* "En akvo de la klara fonto". Ĉi kanton oni povas aŭskulti en la versio de *Jacques Yvart* aperinta en la disko "Brassens plu", eldonita de Vinilkosmo.

[https://youtu.be/RBF6RjD6M\\_I](https://youtu.be/RBF6RjD6M_I)

*Gisèle Berger* partoprenis en la literatura kurso, kaj reage al mikronovelo de *Liven Dek*, vortigis surpapere similan kortuŝan anekdoton, kiun ŝi travivis en sia junaĝo.

<https://youtu.be/jujRh6DempA>

*Gražina Opulskienė* rakontas la kuriozan anekdoton de sia esperantiĝo.

<https://youtu.be/lhMioJY1Zlc>

*Gražina Opulskienė* koncize parolas pri vizitindaj lokoj kun rilato al *Zamenhof* en Litovio.

[https://youtu.be/3ipEOFn\\_e4Q](https://youtu.be/3ipEOFn_e4Q)



## 84 - KECA- Kultura Esperanto-Centro de Avinjono


Nia tradicia pikniko okazos dimanĉon la 29-an de Junio en *Pernes-les-Fontaines* kaj ĝia regiono. Matene, ni vizitos la Farmon de la Papilioj, kaj post la pikniko, ni vizitos la urbon - iaman ĉefurbon de la Graflando "Venaissin" - ĝiajn monumentojn, fontanojn, muzeojn kaj aliajn vidindaĵojn.

## Okazis en nia regiono...

### Plaque en l'honneur de Victor Lebrun au Puy Sainte-Réparate

Vendredi 18 mars, le maire du Puy Sainte-Réparate a dévoilé une plaque en l'honneur de Victor Lebrun, ancien secrétaire de Tolstoï qui a vécu 40 ans au Puy. Lors de l'apéritif, visite de l'exposition, organisée par l'association archéologique et historique puis conférence-souvenir par Jacques Ibanez et Sylvaine Le Magadure car Victor Lebrun était aussi un espérantiste militant.

Centoj da homoj ĉeestis tiun omaĝon al fama vilaĝano, kiu tre modeste vivis en dometaĉo, flegis abelojn kaj praktikis Esperanton. Re prezentis la Esperanto-movadon *Brian Moon*, akademiano, *Claude Nourmont*, redaktoro de "*Le Monde de l'Espéranto*", *Arlette* kaj *Michel Duc Goninaz*, *Sylvaine Le Magadure*, ŝia fratino kaj *Renée Triolle*. Memortabulo estis alkrōĉita sur muron de la iama vinkooperativo, kiu iĝos kultura centro kun biblioteko ktp. Ekspozicio en la urbodomo restos unu semajnon : ĝi tute klare montras, ke *Victor Lebrun* estis esperantisto, kaj ĉiuj konis la verdan stelon (multaj venis por diri, ke la bopatro, la onklo... lernis Esperanton kun li). Post aperitivo, en la vilaĝa kinejo *La Cigale*, *Jacques Ibanez*, kiu eldonigis la memoraĵojn de *Victor Lebrun*, parolis pri li.



Filo de franca inĝeniero, kiu konstruis fervojojn en Rusio fine de la XIXa jarcento, *Victor* memstare edukigis en Turkmenio, Kartvelio kaj Vladivostoko. Li malkovras la filozofion de Tolstoj kaj entuziasmiĝas pri ĝi. Li kuraĝos skribi al la fama verkisto kaj estos la unua pagita sekretario. Li poste aĉetas bienon ĉe la Nigra Maro, kultivas ĝin ĝis la rusa revolucio, estos sendita al Siberio kaj revenos al Francio en 1926. Li skribis siajn memoraĵojn sed ĉefe ideojn pri filozofio, moralo ktp. Pri lia vivo apud *Aix-en-Provence* raportis aktorece kaj emociplene *Sylvaine le Magadure*, kies patro, *Marcel Bourrely*, nun 102-jara, bone konis *Lebrun*. Dum la Landa Kongreso en Marsejlo, mi faros prelegeton kun fotoj pri *Victor Lebrun*. *Renée Triolle*

### Malgaja informo

#### La 26-an de Marto 2016 forpasis *Michel Duc Goninaz*.

*Jen eroj el lia biografio, legebla en La Panteono de Edukado.net :*

"*Michel Duc Goninaz*, naskita en Parizo en 1933, eklernis Esperanton kiel gimnaziano. Akiris licencion pri franca filologio kaj beletriko, kaj agregacion pri la rusa lingvo. Docento en la Provenca Universitato (en Aixo Provenca). Instruis tie la rusan lingvon (1967-96) kaj krome Esperanton (1970-96), kiu ricevis oficialan statuson en la studfakoj kaj diplomoj. Gvidis plurfoje kursojn pri Esperanto kaj pri lingvoscienco en universitatoj de Budapeŝto, San-Francisko, Poznano. Gvidis la revizian laboron por la novaj eldonoj de la Plena Ilustrita

Vortaro de Esperanto de 2002 kaj 2005. Aŭtoris lernolibrojn por la rusa lingvo kaj Esperanto, tradukojn, artikolojn kaj recenzojn. Membras en la Akademio de Esperanto kaj en Franca Esperanto-Instituto."



Nia federacio funebras kaj kondolencas liajn familianojn kaj geamikojn.

### APERO apud Moskvo

Dum vojaĝo al Rusio ĉifebruare, mi havis la okazon partopreni APEROn (AntaŭPrintempa Esperanto-Renkontiĝo).

La restado estis en la stilo de MES : ĉe feriejo, kun abundaj manĝoj, lokaj aranĝoj, kiujn oni ne ĉeestas ĉar estas nia programo, bela ĉirkaŭaĵo. Tamen tute alistila : unue la organizantino mem decidas, kiujn akcepti (ne pli ol 30 homoj ; junaj homoj, progresantoj, kun anonco, ke se oni ne povas diri en Esperanto, oni silentu kaj tute ne krokodilu).

La programo mem konsistas el diversaj eroj, prezentitaj de la partoprenantoj. Pli ol la duono prezentis ion : prelegeto, ludo, koncerto, konkurso pri tradukado, festivalo de poezio ktp., entute tre riĉa kaj diversa programo. La oficiala programo finiĝas je la 1-a matene, kaj sekvas kunkantado ĝis eble la 4-a ! La diversaj ludoj, kiujn oni devas ludi teame, unue tro memorigis la sovetan stilon, sed evidentiĝas, ke ludi en teamo devigas la homojn komuniki, diskuti inter si, do praktiki ! Eble kopienda stilo por niaj semajnfinoj.

*Renée Triolle*

## Niaj federacianoj kaj regionanoj verkas.

> En la februara numero de "Kontakto", artikolo de *Marc Gallardo*, el Marsejlo, pri la Nobel-premiito *Svetlana Aleksejeviĉ*, kiu donis al la redaktoro la ideon dediĉi numeron al "literaturo".

> En "Monato", Februaro 2016, intervjuo de la rus-parolanta ukraina verkisto *Andrej Kurkov* far *Renée Triolle*.

Alia intervjuo kun traduko de unu ĉapitro el lia verko "La amiko de la forpasinto" aperos en "Literatura Foiro".

> En libro, omaĝe al Tolstoj, "*Passion Tolstoï*", eldonita de "*Les éditions du jais*", artikoloj de *Marcel Bourrelly* kaj *Sylvaine Le Magadure* el *Aix-en-Provence* pri lia

sekretario *Victor Lebrun* : "*Ce n'était pas un personnage ordinaire*", kaj de *Renée Triolle* el *La Ciotat* : "*L'espéranto, Lebrun et Tolstoï*".

> Vi certe konas la "*Petit vocabulaire Espéranto*" de *Michel Duc Goninaz*, eldonitan de *Oprhys*, regiona eldonejo en *Gap*, kiu fakiĝis pri lingvolibroj, utilaj al lernejoj.

Ĝus aperis nova eldono de "*Le mot et l'idée*" en rusa lingvo. Se la unuan eldonon verkis *Michel Duc Goninaz* kaj *Olga Grabowski*, al la lasta kontribuis ankaŭ *Nina Korĵenevskaja*, bone konata de tiuj, kiuj ĝuis ŝiajn kursojn pri rusa pentro-arto dum staĝoj.



### ZEO-oj en PACA > 2 - Arles

Estas du ZEO-oj en *Arles* : voja nomplato «*Chemin Docteur Zamenhof*» kaj epitafo sur la tombo de *Honoré Bourdelon*.

Iom pri li : *Honoré Bourdelon* (1892-1980) estis multjara delegito de UEA en Marsejlo.

Li prezidis la Lokan Kongresan Komitaton de la 42-a UK en 1957, kiu kunigis 1 468 gesamideanojn en Marsejlo.

En la somera numero de via gazeto (se mi trovos lokon por tio), vi povos legi anekdotojn pri rilato inter *H. Bourdelon* kaj la fama *Frédéric Mistral*, pri *Jeanne Calment* kaj Esperanto, pri iu bulteno, kiu aperis nur unufoje, ktp.

< LE CENTRE CULTUREL D'ESPERANTO DE MARSEILLE A HONORE BOURDELON

*Le rédacteur tient à remercier chaleureusement les Arlésiens qui ont bien voulu le renseigner sur les ZEO-oj d'Arles et en fournir les photos pour notre bulletin : Blanca Mas-Martinez, conseillère à l'Office de Tourisme d'Arles, qui a photographié la plaque "Chemin Docteur Zamenhof" - Huguette Rozzonelli, du Service de la Culture de la Mairie d'Arles, qui lui a offert gracieusement un ouvrage sur un autre Bourdelon, Georges - Antoine Lemaire, du service Patrimoine de la ville et Pierre Velly, vice-président des Amis du Vieil Arles, qui ont fait des recherches sur Honoré Bourdelon. M. Velly a photographié pour nous la plaque sur la tombe d'Honoré Bourdelon dans le cimetière Arles-Ville.*

### Communiqué : Voulez-vous participer à l'essor de Grésillon ?

Le château de Grésillon, en Anjou, depuis soixante-quatre ans Maison Culturelle de l'Espéranto ([gresillon.org/fr](http://gresillon.org/fr)), renouvellera la moitié de son Conseil d'Administration au cours de sa prochaine Assemblée Générale, le 4 juin prochain. Grésillon a retrouvé un certain équilibre après des moments difficiles, mais il reste beaucoup à faire, et nous manquons de ressources humaines. C'est le moment de redéfinir l'avenir que nous souhaitons pour notre société coopérative [...] Nous n'avons pas encore suffisamment de candidats pour renouveler le Conseil d'Administration. Pour se porter candidat, il suffit d'être sociétaire en achetant (au moins) une part sociale A au prix de 16 €. Ceux qui souhaitent soutenir Grésillon peuvent également acheter une ou plusieurs parts sociales B, au prix de 200 € l'une (qui produisent des intérêts au taux du livret A + 0,5%, dès lors que le résultat de l'année est bénéficiaire). 93 parts B ont été vendues en 2015, qui permettront de financer nos projets, et nous avons 289 sociétaires en 2015. Les candidatures doivent parvenir à l'adresse : [elections@gresillon.org](mailto:elections@gresillon.org) au plus tard le 15 avril prochain. Des précisions sur la procédure de dépôt de candidature (notamment la rédaction de la profession de foi) sont publiées sur notre site : [gresillon.org/ag](http://gresillon.org/ag).

Cordialement, Le Conseil d'Administration de la Maison Culturelle de l'Espéranto.

## Paĝo de la komencantoj (ĉu nur... ?)

### Avec ou sans "n" ?

S'il arrive assez souvent que des débutants oublient le "n" de l'accusatif, il peut arriver aussi qu'ils le mettent là où il ne faut pas.

On trouve ainsi ces types d'erreurs :

Morgaŭ mi akceptos du gastoj. (oubli de l'accusatif ; sujet du verbe "akceptos" : mi ; complément direct : du gastojn)

Morgaŭ venos du gastojn. (usage fautif de l'accusatif ; sujet inversé du verbe "venos" : du gastoj)

Li iĝos reĝon. (usage fautif de l'accusatif ; sujet du verbe "iĝos" : li ; attribut, et non complément direct : reĝo)

2 causes d'erreurs pour un "n" mal placé, donc : un sujet inversé, ou un attribut, confondus avec un complément direct.

Sur la tablo mi vidas unu solan teleron.<sup>1</sup>

Sur la tablo restas unu sola telero.<sup>2</sup>

Nia hundo vundis katon.<sup>1</sup>

Nia hundo iĝis monstro.<sup>3</sup>

Les phrases<sup>1</sup> contiennent un complément direct, tandis que la phrase<sup>2</sup> a un sujet inversé et la phrase<sup>3</sup> un attribut.



Cette utilisation fautive de l'accusatif est connue de certains espérantistes sous le nom : "accusatif de Sisteron" ("sisterona akuzativo"). Ce nom lui a été donné par Raymond Schwartz, car les "n" oubliés ou mal placés abondaient sur les pages du bulletin espérantiste édité par le club de cette ville.

(ndlr. : c'est pourquoi je fais très attention à ce que j'écris dans ces pages : je n'aimerais pas entendre parler un jour d'une "erreur provençale" - "iu Provenca gramatika malglataĵo" !)



### Plurelekta demandaro

laŭ verkoj de Robert Llorens  
eldonitaj de Esperanto-Info

#### 1 - gramatika

a) La urbeto estas ..... granda ol la urbego.

1 - pli ; 2 - malpli ; 3 - plu

b) Kiom ..... eŭroj vi havas ?

1 - da ; 2 - de ; 3 - do

c) Li faras nur tion, kion li volas. Li estas kapric.....

1 - ~ inda ; 2 - ~ebla ; 3 - ~ema

#### 2 - vorto-trezora

ĉ) elektu "helpanto", "helpisto" aŭ "helpo" por traduki la francan "aide"

1 - secours : .....

2 - sauveur : .....

3 - assistant : .....

d) elektu "kudrilo", "nadlo" aŭ "pinglo" por traduki la francan "aiguille"

1 - à coudre : .....

2 - de pin : .....

3 - de boussole : .....



### Superzam'

proponita de

Jean-François Cousineau

1. En kiu urbo naskiĝis Esperanto ?

a- Bjalistoko b- Moskvo c- Varsovio

2. Kiu el la jenaj verkoj de Baghy estas poemaro ?

a- Viktimoj b- Songô sub pomarbo

c- Pilgrimo

3. Kiu el tiuj kantoj de Kajto ne estas kanono ?

a- La plej bela vorto b- Hobio-profesio

c- La velŝipo Magdalena

4. En kiu jaro naskiĝis Zamenhof ?

a- 1859 b- 1869 c- 1879

5. Kiu korelativa finaĵo signas tempon ?

a- am b- e c- om

6. Kiu estas la plej longa rivero en Ameriko ?

a- Amazono b- Misisipo c- Misuro

### Plurelekta demandaro

#### 1 - gramatika

a : 3 ; b : 2 ; 3 - 1

#### 2 - vorto-trezora

ĉ1 : svingi ; ĉ2 : agiti ; ĉ3 : diskuti

d1 : aprobo ; d2 : konsento ; d3 : ornamaĵo

### Solvoj de la demandoj

en EP 103

vintro 2015/2016

### Superzam'

1 a > Lingvo Internacia

2 a > rusa ; 3 b > Kajto

4 c > 57 ; 5 a > es

6 c > Jangzio (6 380 km)



## El la mesaĝkesto de la legantaro

### Philippe Combot

Estas unu mistajpaĵo je la paĝo 10 : "granita slado" anstataŭ "slabo". Sed la vorto "slabo" poste aperas, oni do mem korektas.

*respondo de la red.*

*Prave, Philippe, kaj gratulojn al viaj akraj okuloj. Kompreneble, Mari-Roza kaj mi dekfoje relegis la tekston sen vidi tiun eraron. Ŝajnas eĉ, ke mi vere kredis, ke la vorto estas « slado », ĉar mi dufoje skribis ĝin, kvankam videblas la taŭga « slabo » en la sekva teksto de Daniel Moirand. Mi vane serĉis citaĵon de André Cherpillod, kiu ie skribis, ke manuskripton necesas relegi nek tri, nek dek ... sed cent fojojn antaŭ la publikigo.*

### Monika Arnaud

Dankon pro la redaktado kaj sendado de tiu tre interesa gazeto, kiu havos pli da legantoj en 2016 !

*respondo de la red.*

*Se mi bone komprenis, Monika, vi iĝis ne nur sekretarino de Espéranto-Gap, sed ankaŭ antaŭdiristo ? Espereble la kresko de la membronombro pravigos vin. Afero sekvota...*

Alvenis papera versio de nia gazeto ; mi pli atente legis ĝin. Dankon denove pro tiom da informoj pri nia federacio. Bonan strategion vi havas... vi proponas verki pri iu temo en diversaj venontaj numeroj de la gazeto, tiel vi "fideligos" legantojn !

Pri ZEO-oj eble vi ŝatus ricevi pli da informoj pri ili. En Gap estas Zamenhof-strato ; pri ĝi mi scias nenion sed povus/os informi se vi deziras. Pri Manosko, certe José Grammatico rakontos multe al vi.



## À noter sur votre agenda

### dans notre fédération

**mai 5-8** - Marseille (13) : Congrès Euroméditerranéen (infos en page 1)

**mai 22** - Taradeau (83) - panorama du Taradel : pique-nique du club de Fréjus - Saint-Raphaël (M.Prezioso 04 94 83 06 88)

**juin 26** - repas de fin d'année scolaire du club de Fréjus - Saint-Raphaël (lieu à définir) (M.Prezioso 04 94 83 06 88 ou C.Graissaguel 04 94 95 66 18)

**juin 26** - Pernes-les-Fontaines (84) : pique-nique du club d'Avignon (esperanto-avignon@laposte.net)

### en France

**printemps et été** - programmes riches et variés

> Château de Grésillon - Baugé-en-Anjou (49)

gresillon.org

> Kvinpetalo - Bouresse (86) informoj@kvinpetalo.org

**avril 23-24** - Lyon (69) Stage étude et perfectionnement, au KoToPo. (annemarieferrier@orange.fr)

### en Europe

**juillet 23-30** - Nitra (Slovaquie) : 101ème Congrès Universel (nitra2016.sk)

**août 20-27** - Frascati-Rome (Italie) : 83ème Congrès Italien (kongreso@esperanto.it)

*respondo de la red.*

*Kompreneble, Monika, mi ŝatus ricevi informojn, kaj pri Gap, kaj pri ĉiuj aliaj lokoj en PACA, kie estas ZEO-oj. Mi petas de vi, la legantoj, ke vi sendu fotojn kaj klarigojn pri la Zamenhof/Esperanto-objektoj de via komunumo aŭ de alia(j) en ĝia proksimeco.*

### Anita Collomb

Dankon pro la korektado de mia teksto !

*respondo de la red.*

*Ne dankinde, Anita. Estas tute normale, ke mi korektu ĉiujn ricevitaĵojn, ĉu en Esperanto, ĉu en la franca, por ke nia gazeto estu kiel eble plej senerara.*

### Roselyne Favier

Dankon pro via sendo. Mi denove precizigas, ke unu sendo sufiĉas ; mi recevis la gazeton komputile kaj poŝte. Tio ne estas bona por la kaso de la federacio !

*respondo de la red.*

*Mi ja bone notis vian peton pri la nura reta versio, Roselyne. Sed tiun retan sendas mi, dum alia skipo zorgas pri la papera, kaj foje mi ne tuj transdonas la informojn, aŭ eĉ forgesas... Mi homas... !*

### Yves Nicolas

Dankon pro la sendo de la ampleksa kaj informriĉa bulteno "Espéranto-Provence". Jen la normanda, kiu aperas trifoje jare po 8 paĝoj (en 2015 abonis ĝin - abono ankaŭ valoras kiel aliĝo al la regiona asocio- 70 homoj). Bonan kuraĝon.

*respondo de la red.*

*Dankon pro viaj mesaĝoj kaj regiona bulteno, Yves. Viaj kuraĝigoj venas de iu, kiu bone scias, kion signifas la vortoj « sindonemo » kaj «laboro », ĉu ne ?*